*Fiŝamiko al li diris "Ne tre gravas la distancoj;*
*Aliborde estas ja alia lando kaj la Francoj!*
*Ju pli longen de Anglujo, pli apude al Francujo!*
*Do, ne timu! Ĉar sur ambaŭ bordoj jen por vi patrujo.*
*Vi konsentas, ĉu ne vere? Vi konsentas partopreni?*
*Vi konsentas, ĉu ne vere? Ho, konsentu partopreni!*

Kiam la dancado finiĝis, Alicio interne sentis ke ĝi estas teda kaj eĉ ne sendanĝera por ŝi; tamen ŝi diris ĝentile :—

"Mi tre dankas; mi tre interesiĝis vidante la dancadon; kaj speciale plaĉis al mi tiu kurioza kanto pri la merlango."

"Ho, pri la merlangoj" diris la Falsa Kelonio "vi kompreneble vidis ilin?"

"Jes" Alicio respondis "tre ofte mi vidis ilin en *la frit*——"

"Pri *Lafrito*, mi ne scias kie sidas tiu urbo" diris la Falsa Kelonio "sed se vi tre ofte vidis ilin, vi kompreneble konas kian aspekton ili havas?"

"Mi kredas ke jes" diris Alicio, konsiderante. "Ili havas la vostojn en la buŝoj; ankaŭ ili estas kovritaj per paneroj."

"Pri la paneroj vi eraras" diris la Falsa Kelonio "ili ne povas pro la marviŝo teni panerojn sur la korpo. Sed pri la vostoj vi *ne* eraras, kaj la kaŭzo ja estas——"

En tiu momento la Falsa Kelonio oscedis kaj fermis la okulojn, dirante al la Grifo: "*Vi* diru al ŝi pri la kaŭzo kaj ĉion tion."



"La kaŭzo estas" diris la Grifo "ke ili persistis iri danci kun omaroj; do, oni ĵetis ilin malproksimen en la maro; do ili havis tre longan falon; do, la vostoj fiksiĝis en la buŝoj, kaj oni ne povis malfiksi ilin; do—jen ĉio."

"Mi dankas" diris Alicio "tio estas por mi tre interesa. Ĝis hodiaŭ mi sciis tre malmulte pri merlangoj."

"Mi povas diri al vi pli ol tio, se al vi plaĉos," diris la Grifo. "Ĉu vi scias kial oni nomas tiun fiŝon merlango?"

"Mi neniam pripensis tiun demandon" diris Alicio. "Kial do?"

"Ĉar ĝia lango estas ĉiam en la maro" klarigis la Grifo "kaj la maron ĝi prefere silabas per 'e' nur pro ĝia partianeco por la Francoj; vi kredeble rimarkis per kia sopira voĉo ĝi kantis '*pli apude al Francujo.*'"

(En la angla teksto li tute alie klarigis la nomon. Por ekkompreni ĝin, oni devas identigi en la pensoj la vortojn "merlango" kaj "blankigilo" kiuj en angla lingvo havas saman sonon *ŭhajting*. Jen la teksta dialogo :—

"Ĉu vi scias kial oni nomas ĝin merlango?" diris la Grifo.

"Mi neniam pripensis tiun demandon" diris Alicio. "Kial do?"

"Ĝi poluras la bot-kaj ŝuojn" diris tre solene la Grifo.